Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 30-an de marto 2017 per Skype.

(Protokolo aprobita la 21-an de aprilo 2017)

Partoprenis:
Amelie Matt en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Hilde Dahlberg en Mo i Rana
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Mario Machlik en Tromsø
Herman Ranes en Trondheim
Ulf Lunde en Os ekde punkto 4.

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 23-an de februaro
Aprobita.

2. Ekonomio
La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 58 046,- (55 991,-) Skagen Høyrente kr 130 871,- (130 625,-).

3. Jarkalkulo
La kasisto finfaris la jarkalkulon kaj ĝi montras malgrandan profiton danke al kelkaj eksterordinaraj enspezoj.

4. Jarraporto
Ni laboris pri la jarraporto kreinte Google-dokumenton, kiun ĉiuj estraranoj povas redakti. Ankoraŭ mankas kelkaj partoj, sed ni certe sukcesos pretigi ĝin dum la venonta interkonsiliĝo.

5. Landa kunveno
La informoj pri la landa kongreso aperis en la unua numero de Norvega Esperantisto. Ni ankoraŭ ne havas la superrigardon pri aliĝintoj, sed pluraj estraranoj jam aĉetis flug- aŭ trajnbiletojn al Sandnes. En la venonta membrogazeto ni devus anonci la limdaton de la aliĝo kaj ni ankaŭ devos aperigi la tagordon de la Landa Kunveno.

6. Eventualaĵoj
Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 22:20
La venonta interkonsiliĝo okazos la 20-an de aprilo 2017.

Raportis Mario Machlik